

MEDITADO

surbaze de la Evangelio laŭ Sankta Johano (2, 1-11)

Ni preĝu al la Sankta Spirito, ke Li descendu en niajn korprofundojn kaj plenigu nin per la Saĝeclumo kaj Gracofontanoj, por ke ni komprenu ĝuste la Dian Parolon kaj volu fervore plenumi Dian volon. La Plejsankta Virgulino Maria – nia Patrino kaj Reĝino gvidu nin al sia Filo Jesuo.

El la fragmento de la Evangelio laŭ Sankta Johano ni sciigas, ke en Kana Galilea okazis edziĝofesto kaj tie estis la Patrino de Jesuo kaj ankaŭ Jesuo kun la disĉiploj estis invititaj. Kaj kiam mankis vino, la Patrino diris al Jesuo, ke mankas vino al la gastoj. Kvankam Jesuo diris, ke tiu problemo ne apartenas al Li kaj al lia Patrino kaj ankaŭ ne venis lia horo, tamen la Patrino diris al la servantoj, ke ili faru ĉion, kion Jesuo diros al ili. Jesuo diris al la servantoj, ke ili plenigu per akvo ses akvokuvojn ŝtonajn, kiuj estis uzataj por ritaj purigoj de la Judoj. La servantoj plenigis la akvokuvojn per la akvo ĝis la rando. Kiam la festenestro gustumis la akvon, kiu fariĝis vino, ne sciis de kie ĝi estas. Li diris al la fianĉo, ke ĝuste li la fianĉo rezervis la bonan vinon ĝis nun kontraŭe al la aliaj solenaĵoj, dum kiuj je la komenco estas bona vino kaj poste pli malbona. En Kana Galilea okazis komenco de mirakloj, per kiuj Jesuo elmontris sian gloron kaj liaj disĉiploj ekkredis al Li.

La priskribo de tiu evento – de la edziĝofesto, kiun partoprenis Jesuo kun la disĉiploj kaj sia Patrino Maria, kaŭzas la demandojn:

Ĉu en niaj koroj, en niaj hejmoj, en nia ĉiutaga vivo reĝas Jesuo? Ĉu dum la vivorapido ni trovas la tempon por turni niajn pensojn, niajn korojn al Li? Ĉu ni scipovas aŭdi, kion Li rekomendas al ni? De tempo al tempo ni travivas diversajn solenaĵojn, ni observas belajn tradiciojn, sed ĉu ni ĝuste ilin travivas kun Jesuo? Ĉu nia kredo je Kristo estas forta tiom, kiom la kredo de la apostoloj, de la unuaj kristanoj?

„Restu firmaj en la kredo! Restu firmaj en la espero! Restu firmaj en la amo! – vokis Sankta Patro Benedikto la Deksesa dum la apostola vojaĝo al Pollando maje 2006. Res-

ti firma en la kredo – tio signifas konstrui la domon de la vivo ne sur la sablo – ne sur ŝanĝemaj, mensogaj teorioj, sed sur fortaj fundamentoj – sur la Roko. Kaj tiu roko estas Kristo. Kiu apogas sian vivon sur Kristo kaj ne subiĝas al relativaj, ŝanĝemaj influoj, povas diri post Sankta Paŭlo: „Jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi!“ (Gal 2,20).

Sankta Patro Benedikto la Deksesa, parolante antaŭ grandega homamaso sur la karkovaj Herbejoj, la 28-an de majo 2006, interalie diris: „Mi petas vin, ke vi starante sur la tero, tenu fiksitan rigardon al la ĉielo – al Tiu, post kiu ekde dumil jaroj iras sekvantaj generacioj, vivantaj sur nia tero, trovante en Li definitivan ekzistosencon“.

Vivante sur la tero inter diversaj obstakloj, malfacilaĵoj, ni tenu fiksitan rigardon al Kristo, por ke ni povu fortigi nian kredon, ĉar nur Li estas vojo, vero kaj vivo. „Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per Mi.“ (Joh. 14,6). Nur Jesuo Kristo repacigis la teron kun la ĉielo – la homon kun Dio – iam per la kruca morto kaj senĉese per la sensanga Mesofero. Kaj Li invitas nin al la Trono de la Mizerikorda Amo – al la fonto de la vivo kaj sankteco – al la fonto de ĉiu konsolo – por superŝuti nin per la Gracodonoj – por profundigi nin en la Amofontanoj – por fortigi nin per la Sanktaj Korpo kaj Sangoj – por doni al ni la vivon.

„Vere, vere mi diras al vi:

Se vi ne manĝas la Korpon de la Filo de la homo kaj ne trinkas lian Sangon, vi ne havas en vi la vivon.

Kiu manĝas mian Korpon kaj trinkas mian Sangon, tiu havas eternan vivon; kaj Mi revivigos lin en la lasta tago.“ (Joh 6,53-54).

Prilaboris Zofia Kamieniecka